

# Eŭropa Bulteno

Junio 2013, Numero 128

## EEU-KONGRESO EN RIJEKA 2014



Nia teamo sukcesis krei informilon ĉefe por reklami la kongreson dum la UK en Rejkjaviko kaj ĝis fino de julio ni publikigos la unuan bazan version de la kongresa retejo kun informoj pri datoj, loko, regiono kaj kotizoj. La paĝaro kun informoj kaj eblo aliĝi al la 10-a jubilea kongreso de EEU en Rijeka (Kroatio) estos preta dum aŭtuno. La informilo donas pli da informoj ol la ĝisnunaj artikoloj inkluzive de la kongreskotizoj kaj aliĝlimdatoj. La ĉefaj organizaj aktivecoj jam estis sukcese faritaj: certigita la kongresejo kaj rezervitaj la hoteloj. Ĉar la kongreso okazos en la jaro kiam UK estos sur alia kontinento, kaj iasence proksime al mezo de Eŭropo, en atrakcia regiono kun multaj naturbelajoj, apudmare, ni esperas ke venos pli da kongresanoj ol kutime. Kontribuu per via partopreno al la bonvenigo kiun EEU tiel esprimas al sia nova landa asocio: la kroatia. Ĉiuj interesitoj povos tuj post la kongreso en Rijeka daŭrigi al Somera Esperanto-Studado en Slovakio kaj post ĝi ankaŭ al la UK en Bonaero.

**10-a kongreso de EEU - 2014**



6-a - 12-a de julio 2014

Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj,  
malmultekosta demokratia komunikado

Pli da informoj:  
[www.europano.eu](http://www.europano.eu)  
<http://eeu-kongreso.webnode.com/>



Rijeka - Kroatio

Reklamu la kongreson en lokaj Esperanto-revuoj. Se vi organizas Esperantan renkontiĝon kaj pretas aldoni la informilon pri la kongreso al la kongresaj materialoj ni volonte sendos al vi necesan stokon da informiloj. Petu de ni pliajn informojn.

Zlatko Tišljarić

## KONTUROJ DE NOVAJ ASPEKTOJ DE LA E-MOVADO EN EŬROPO

Kiel mi jam skribis en la pasinta numero, la tezo ke novspeca movado konturiĝas en Eŭropo ricevas ĉiam pli da poraj argumentoj. Nome dum la klasika movado kadre de E-societoj ĉiam pli agonias kaj daŭre malkreskas, komenciĝis eksploda kresko de profesia aktivado de etaj E-entreprenoj kun salajrataj esperantistoj dank al projektoj financataj de Eŭropa Unio.



E@I estas certe la plej granda giganto tiusence. Al ĝi estis nur ĉi jare aprobita plia granda subvencio por pluevoluigi unikan paĝaron [www.slovakie.eu](http://www.slovakie.eu) por lerni la slovakon lingvon en valoro de preskaŭ 400.000 eŭroj kaj dua granda projekto en valoro de preskaŭ 300.000 eŭroj por instrui instruistojn pri sekureco en la reto, en kiu E@I estas partnero. Por realigi tiel ampleksan laboregon, speciale kiam temas pri komplikaj kaj grandaj projektoj, kaj kun nun jam momente entute ses projektoj ĉiaspecaj kies kompleta valoro estas pli ol miliono da eŭroj (inkluzive de la mono por ĉiuj partneroj de E@I) oni devas havi pliajn pagatajn oficistojn kaj E@I havas jam tri (du regule salajrataj oficistoj kaj unu laŭfakture pagata). Kadre de projektoj de E@I la kerna partnero en preskaŭ ĉiuj projektoj estas berlina esperantista firmao Studio GAUS, kiu faras la plej grandan parton de la plenuma programista laboro en tiuj projektoj.



Tiajn grandajn kaj komplikajn projektojn ĝis nun inter esperantistoj gajnis kiel kunordigantoj nur E@I jam plurfoje kaj EEU unu foje. Ĝenerale EEU ricevis en 2012 nun jam la 4-an fojon subtenon el la mono de EU kaj el tiu mono ni povas salajri nian direktorinon Maja Tišljár, kiu apud laboro por EEU laboras profesie kiel monakiristo por

projektoj kaj ekstera taksanto de projektoj financataj de EU.

Esperantistoj ĝis nun ĉefe akiris subvenciojn de EU por mapli grandaj kaj relative simplaj projektoj – partnerecoj (ĉu kadre de Grundtvig aŭ Comenius), kiuj ĝuste pro ilia financa kaj enhava simpleco ofte pli taŭgas por institucioj sen pagataj oficistoj ĉar en ili povas teorie



relative simple kiel partneroj partopreni eĉ relative malfortaj asocioj kaj societoj. La ĉiam pli fama Esperanto-urbo Herzberg en Germanio daŭre plispertiĝas pri gajno kaj gvidado de tiaj projektoj kadre de lerneja (Comenius) kaj plenkreskuleduka kunlaboro (Grundvig) kaj ili ankaŭ ricevis du novajn projektojn. La agado estas gvidata de Interkultura

centro Herzberg, kiu oficiale ne havas profesiulon, sed la agadon ĉiam pli profesie plenumas la duopa teamo Korody/Zilvar kun helpo de multaj volontuloj. La teamo de Kosmo kun sidejo en Britio ankaŭ gajnis du plian samtipajn projekton ĉi-jare. Duonsalajron ricevas oficisto ankaŭ en Maribora Inter-kulturo pro la daŭra partopreno en grandaj projektoj ĉefe kiel partnero. Ekzistas jam pluraj aliaj E-organizaĵoj kiuj ricevis financan subtenon ĉefe kadre de Comenius kaj Grundvig pri kies situacio rilate la profesion plenumon mi ne havas superrigardon sed mi supozas ke en kelkaj el ili ankaŭ oni pagas parte aŭ tute salajron de almenaŭ unu profesiulo.

Pro tio formiĝas ĉiam pli serioza teamo de pli ol deko da kvalitaj profesiuloj kiuj ĉiam pli bone komprenas la manieron kiel akiri monon de EU kaj kies salajroj dependas de tiuspeca agado. Pro tio ankaŭ la E-movadoj en landoj kie tio okazas havas alispecan subtenon por la estonta movada vivo. Ĉiuj el tiuj novaj centroj uzas Esperanton en sia reciproka internacia partnera komunikado kaj ili daŭre mem kreas novajn junajn kapablulojn bezonatajn por sia laboro. Pro tio ili forte kunlaboras kun la ĝenerala Esperanto-movado kaj grave ĝin helpas: E@I daŭre organizas Somerajn Esperanto-Studadojn kiuj iĝas inter la plej bonaj someraj Esperanto-aranĝoj por homoj dezirantaj komenci aŭ daŭrigi lerni Esperanton en diversaj nivelo. Studio GAUS daŭre teknike prizorgas lernu.net, la plej grandan paĝaron por reta lernado de Esperanto. EEU dank al la eŭropaj subvencioj kaj salajrata persono povas multe pli kvalite plenumi ankaŭ siajn poresperantistajn taskojn, Esperanto-Centro en Herzberg, daŭre organizas aranĝojn por lernejoj kaj por instruistoj de Esperanto, Itala Esperanto-Federacio povis fondi Centron por Esperanto kaj Interkulturo en Mazara del Vallo. Dum unuflanke la klasika movado sen profesiuloj iom post iom vere troviĝas en danĝero malaperi en kelkaj landoj (pri tio raportis pluraj el la raportistoj kiuj verkis artikolojn pri la landaj agadoj por EB), novaj konturoj de grava kresko aperas sub la egido de eŭropa financado ĉefe sur la kampo de edukado kiu stimulas profesion agadon. Al tio grave kontribuas ankaŭ ESF, kiu subtenas la grandegajn projektojn de la E-movado mem kia [lernu.net](http://lernu.net) kaj [edukado.net](http://edukado.net) kaj ebligas ke ili estu prizorgataj profesie de pagataj kunordigantoj aŭ teamoj. Nur tia profesia agado ebligas ke ili daŭre restu kvalitaj.

Aparte elstaras ankaŭ kelkaj specifaj agadoj kiel la projekto WikiTrans efektivigata kunlabore de la entrepreno GrammarSoft kaj la Suddana Universitato rilate aŭtomatan tradukadon de la anglalingva vikipedio al Esperanto kaj aro da malpli grandaj realigantoj de projektoj valoraj por Esperanto kiel la profesia muzika entrepreno Vinilkosmo kaj pluraj kreantoj de tre utilaj softvaroj por la E-movado far profesiuloj kiuj tion faras en sia libera tempo. Resume eblas konstati ke ĉi tiu agado jam enpostenigis sufiĉe pli da profesiuloj ol havas ilin CO de UEA. Ŝajnas al mi ke la Eŭropa movado travivas renaskiĝon.

Zlatko Tišljarić

## NOVA COMENIUS-PROJEKTO EN LA ESPERANTO-URBO

Jam dua lernejo el Herzberg am Harz ricevis eŭropan subvencion enkadre de la Programo por dumviva lernado. Post partopreno en sukcesa Comenius-projekto kun brita kaj hungara lernejoj, en 2012 Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka, Esperanto-instruistinoj en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, ellaboris novan projekton por la 'Ernst-Moritz-Arndt' Gimnazio kaj partnerlernejo 'G. Grassa' en Mazara del Vallo en Sicilio, Italio kaj 'Pálffy Miklós' faka mezlernejo en Győr, Hungario.



Post komenca korespondado, informintersanĝo kaj ekspozicioj el la senditaj materialoj en aprilo 2013 okazis la unua vizito de la projektpartneroj el Germanio kaj Hungario al la gastiganta mezlernejo en Italio. La unusemajna restado inter 12-19.04.2013 bone sukcesis: la lernantoj bonfartis ĉe siaj gastigantaj familioj, amikiĝis kun samaĝuloj kaj spertiĝis per vizito al la partnerlernejo. La urborigardado kaj la ekskursoj taŭge kontribuis al la lerncelo: ekkoni lokan geografion, historion, kulturon,

tradiciojn. Inter la projekttaskoj estis ankaŭ sinprezentado, rakontado pri propralandaĵoj, regionaj legendoj, bildprezentado de la propra urbo, komparado de paskaj kutimoj. La lernantoj preparis kaj prezentis ankaŭ teatraĵetojn, scenetojn al la publiko. La loka televido ĉiutage raportis pri la eventoj kaj intervjuis lernantojn, instruistojn, la organizantojn kaj helpantojn de la Comenius-projekto.

Pri la unusemajna internacia kunlaborado aperis 8 raportoj en regiona televidkanalo en Mazara, gazetartikolo en Harz Kurier, hejmpaĝa raporto de urbo Herzberg.

Ligilo al detaloj, fotoj, filmoj [http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog\\_id=94034240](http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=94034240)

Zsófia Kóródy

## NOVA GRUNDTVIG-PROJEKTO EN POLLANDO, GERMANIO KAJ NEDERLANDO

Interkulturo por tutviva lernado ege gravas. Centro de Interkultura Edukado el Pollando (kunordigantino Halina Komar), partneroj en Nederlando (edukado.net, Katalin Kovats) kaj Interkultura Centro en Herzberg am Harz - Esperanto-urbo (Peter Zilvar, Zsofia Korody, Ewa Kukielka) sukcesis akiri subvencion por eŭropa Grundtvig-projekto. Kultura Esperanto-Asocio (Laszlo Szilvasi), plia ebla partnero el Hungario ankoraŭ estas en atendolistoj.

Ni elektis por la projekto landojn kun lingvoj el diversaj lingvaj familioj: ĝermana (germana kaj nederlanda), slava (pola) kaj aldone la finno-ugra (hungara). Aparte interesas kompari la folkloron, morojn, danckutimojn, muzikstilojn, arton, aliajn kulturtraĵojn, ktp.

La projekto intencas altigi ĉe la partneroj la konscion pri la pozitivaj aspektoj de la interkultureco kaj la staton de aktiva toleremo. Ni volas emfazi, ke eblas ŝanĝoj de la konscio de la multkulturaj socioj, kie vivas diversaj etnaj grupoj, kiuj ofte ne akceptas unu la alian. La kunlaboro daŭros du jarojn, inter 2013-2015. En laborgrupoj ni volas prepari projekt-aktivecojn en formo de fakprelegoj, invitoj de etnaj grupoj, vizitoj, kursoj, ktp. Krome ni volas prepari specialajn interkulturajn festojn por la publiko kaj aliajn interkulturajn agadojn. Kiel internan pontlingvon ni uzos Esperanton kaj jam nun ni ĝojas pri interesa kaj verŝajne tre fruktodona kunlaboro. Dum dujara kunlaboro ni volas trovi uzeblajn rimedojn kaj prilabori la didaktikajn konsilojn: kiamaniere oni povus faciligi la procedon de transformigo de „multkulturaj socioj” (ofte konfliktigaj), al tolerema, paca kunvivado en lokaj „interkulturaj komunumoj”.



Skiza informo preparita de Projektaj Partneroj troviĝas sur la paĝaro de edukado.net <http://edukado.net/novajhoj?id=360>. Certe indas aldoni ke la tuta ricevita mono por 3 organizaĵoj el PL,NL,DE sume 55 mil euroj, estos uzata strikte por la movada agado ĉar la projekto estis/estas/estos entute prilaborita de ni mem volontule, sen iu ajna ekstera peranto.

Halina Komar

## **PLIA NOVA EŬROPA POJEKTO KADRE DE GRUNDTVIG**

Nederlanda Esperanto-Junularo, Esperanto-Asocio de Skotlando, Junulara Esperantista Franca Organizo, Federacio EDE, kaj Pola Esperanto-Junularo lanĉas strategian dujaran partneriĝon, subvenciatan de Europa Unio, pere de la programo Tutviva Lernado - Grundtvig - Partnerado.

La ĉeftemo estas: "Volontulado kiel persona pluevoluiĝo: kiel pliboniĝi?" La fokuso estos ĉefe (sed ne nur) pri plifortigo de junularaj Esperanto-organizoj, per kunlaborado, kunpartigo de bonaj praktikoj, kaj trejnkursoj dum la projektvivo. Esperanto-organizo estas preskau ĉiam bazitaj nur sur volontula laboro, sed aranĝas mirindajn agadojn. Tamen, oni ja povas multon plibonigi, adresante projektmastrumajn teknikojn kaj kvalilkontrolon.

Estas antaŭviditaj almenau ses internaciaj renkontiĝoj de la projekto, ĉefe dum Esperanto-eventoj, por fokusiĝi pri:

- organizado de eventoj
- teamlaboro, interkulturaj teamoj, mastrumado de volontuloj
- merkato
- financa mastrumado kaj monakirado
- negocaj kapabloj.

La buĝeto por la tuta projekto estas je 89.000 €. Plie, Centro-Esperanto Torino kaj ARCI Esperanto estas en atendolisto, en sufiĉe alta loko en la vico. En aŭtuno EU informos ĉu ili rajtos esti en la projekto, plialtigante tiukaze la tutan buĝeton per pliaj 40.000 €. "La projekto estas eksterordinara ŝanco por ke nia junularo spertiĝu kaj kvalitagadu. Ni do strebos ĉiukaze partopreni la trejnadaron, esperante ke aŭtune falu sur nin folioj kaj EU-mono", komentas Michael Boris Mandirola, nome de la italaj organizoj en atendolisto.

"TEJO ĝojas pri la aljuĝo de EU-subvencio por pluraj landaj sekcioj kaj plenkreskaj organizoj por siaj junularaj sekcioj", komentas Łukasz Żebrowski, prezidanto de TEJO. "Tio montras la vivecon kaj junecon de la Esperanto-movado, kaj aliflanke multe helpas la eŭropan E-movadon pligrandiĝi. Ni esperas, ke ĉi tiu agnosko pri la kvalito de la projekto instigos aliajn similajn iniciatojn de niaj sekcioj", li aldonas.

La projekton ideis, evoluigis, kaj plusekvos Kosmo Strategio Ltd. kune kun la envolvitaj organizoj.

Francesco Maurelli

## **FRANCUJO RISKAS REZIGNI LINGVAN DEMOKRATECON ĈE LA UNIVERSITATOJ**

*Se la leĝpropono de Ministrino Fioraso estus aprobita ĉe Senato, ankaŭ la francaj junuloj estus devigataj ofte rezigni pri sia lingvo ĉe la Universitato.*

En Francujo, lando kun longatempa tradicio pri protektado de la nacia lingvo, la Parlamento cedis al la tendenco – aktuala ĉe multaj Eŭropaj landoj – anglalingvigi la akademian kursojn. La dua artikolo de la leĝo ĵus proponita de Ministrino Fioraso fakte ebligas akcepti, en cirkonstancoj “pravigitaj de pedagogiaj necesoj” (vortumo taŭga por pravigo nurŝajna, ĉar ĝi signifas “ĉiufoje kiam la Universitato tion taksas oportuna”) esceptojn al la Toubon-leĝo de 1994, kiu eksplicite postulas aranĝi la kursojn francalingvaj.

La leĝo Fioraso – pretendanta klerismajn inspirojn pri universala disvastigo de la sciaroj – celas plinombri la eksterlandanojn studentajn ĉe la francaj universitatoj (de la nunaj 12% al 15% ĝis 2020). Tamen, kontraŭ la aplikado de tiu leĝo multas protestoj en la universitata medio, ĉar oni konscias, ke la esceptoj kiujn ĝi allasas estas nenio alia ol Troja ĉevalo celanta iom-post-ioman kaj ĉiean angligon de la instruado. Iam estonte, la rektoroj, el preteska monmanko, forigos la duoblaĵojn (tio estas la franclingvaj kursojn) ilin aranĝante nur anglalingvaj.

Asocio Nitobe (<http://disvastigo.esperanto.it>) denuncas tian lingvan politikon, kiu probable diskriminacie efikos sur tiujn, kiuj volos sialande studi denaskalingve, kaj kiu malaltigos la instruado-kvaliton en la francaj universitatoj.

Redakcio de Elektronika Revuo Disvastigo

## **ITALA E-JUNULARO APLAŬDAS AL LA VERDIKTO DE LA ADMINISTRACIA TRIBUNALO DE MILANO KONTRAŬ ANGLIGO DE MILANA POLITEKNIKO**


Itala Esperantista Junularo esprimas plenan kontenton pro la historia verdikto de la administracia tribunalo de Milano, kiu nuligas la decidon de la Milana Politekniko laŭ kiu ekde la onta universitata jaro ĉiuj magistriĝaj kaj doktoriĝaj kursoj estus anglalingvaj.

La tribunalo taksas tiun ĉi decidon neakordigebla kun la leĝo n-ro 1592/1933, kiu fiksas la uzadon de la itala lingvo en ĉiuj universitatoj. Agnoskas, krome, ke internaciigo “ne signifas submeti la instruadojn kaj la sciencan kulturon praktikatajn en publika itala universitato al aparta fremda lingvo, eĉ se ĝi estas plej disvastiĝinta komunikilo inter diversnaciecaj personoj”, ankaŭ ĉar “La strategia celado antaŭfiksas utiligon je sole la angla lingvo, sed ĉi tio kunportas malfermiĝon limigitan al sole la anglalingvaj kulturoj, laŭ selekta kriterio nekohera kun la celo de internaciigo.”

Aplaŭdas do nia asocio al la agnosko de gravegaj principoj de justeco kaj demokratieco lingvaj, kaj esprimas la deziron pri la pli vasta internaciigo de la itala universitata medio, bazita tamen sur egalecaj kaj vere internaciecaj principoj, sen enmetado de la itala lingvo kaj kulturo en pozicion subgitan al tiu de la angla.

Redakcio de Disvastigo

## **LA PREZIDANTO DE EEU PRELEGIS AL LINGVO-TESTISTOJ**



La 1-an de julio, tuj post la irlanda prezidanteco de EEU, mi prelegis pri la propedeŭtika valoro de EEU al grupo de lingvo-testistoj (The European Language Certificate) el Germanio, Pollando kaj Turkio en Frankfurto. Ili montris grandan intereson pri tia uzo de Esperanto. Mi prelegis germane, pole kaj angle. Ankaŭ ĉeestis Roland Schnell el Berlino, kiu bone parolis pri la praktika valoro de nia lingvo.

Seán Ó Riain

## RENOVIGITA NACIA KONVENCIO PRI EU EN SLOVAKIO



La 9-an de majo 2013 dum la „Tago de Eŭropo“ en Bratislava sub aŭspicio de Ivan Gašparovič, prezidento de Slovakio, okazis malferma plenkunsido de renovigita Nacia Konvencio pri EU, kiun organizis Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio kunlabore kun Centro por Eŭropaj Aferoj je la temo "Kian Eŭropon ni deziras?" La plenkunsidon

malfermis per sia parolado Ivan Gašparovič, prezidento de Slovakio. Robert Fico, ĉefministro de Slovakio kaj Maroš Šefčovič, vicprezidanto de Eŭropa Komisiono en enkondukaj paroladoj prezentis siajn ideojn kaj rekomendojn pri eŭropa politiko en Slovakio. Inter aliaj parolantoj en diskutpaneloj estis prezidantoj de parlamentaj politikaj partioj, membroj de nacia kaj Eŭropa Parlamento, reprezentantoj de institucioj de tuta socio inkluzive de civitanaj organizoj, diplomata koruso kaj aliaj eksterlandaj gastoj.

Plenkunsidaj diskutoj klare montris urĝan bezonon de tutsocia diskutplatformo pri eŭropaj temoj kaj problemoj. Dum la venonta jaro la platformo laboros en tri laborgrupoj pri: 1) Defioj de nuna eŭropa integriĝo, 2) 10-jara membreco de Slovakio en EU, 3) Slovacia prezidanteco en 2016. Ĉiu el la laborgrupoj estos estrata de prezidanto kaj tri vicprezidantoj. La laborgrupoj laboros en tri kunsidoj ĉiu. Ili formulos strategiajn politikajn konsilojn al la registaro de Slovakio en eŭropaj aferoj, ne nur rilate al la Eŭropa Unio, sed precipe al civitanoj. Proponitaj rekomendoj estos konstrua kontribuo de Slovakio al demokratiigo de EU, pli efika agado kaj sukcesa daŭrigo de procezo de eŭropa integriĝo kun subteno kaj partopreno de civitanoj. Post unujara laboro okazos la 9-an de majo 2014 plenkunsido de Nacia Konvencio pri EU kiam estos prezentitaj diskutitaj kaj aprobitaj strategiaj eŭropaj rekomendoj al la registaro de Slovakio en tri ĉefaj terenoj.

Amaskomunikiloj vaste informis pri la plenkunsido de Nacia Konvencio pri EU ĝeneralan publikon en Slovakio kaj eksterlande.

La plenkunsidon partoprenis ankaŭ tri esperantistoj Peter Baláž de Edukado@Interreto, Ján Vajs de Slovacia Esperanto Federacio kaj Jozef Reinart de Eŭropa Esperanto Unio. Ĉiuj tri aktive laboris jam en Nacia Konvencio pri EU en jaroj 2004-2006 en la Laborgrupo pri lingva politiko en unuiĝanta Eŭropo. Ili laboros ankaŭ en la renovigita Nacia Konvencio pri EU en la unua laborgrupo pri defioj de la nuna eŭropa integriĝo. Ili planas surtabligi en la laborgrupo urĝan bezonon de serĉado de solvoj de amasigitaj lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU, kiu estas esenca kaj ŝlosila premiso por sukcesa daŭrigo de eŭropa integriĝo.

Jozef Reinart



## KONGRESO DE FRANCA ESPERANTO-UNUIĜO KAJ DE IFEF EN ARTIGUES

La unuan fojon okazis komuna kongreso de Internacia Fervoĵista Federacio (IFEF) kaj Espéranto-France (UFE). Ĝi kunvenigis ĉ. 250 homojn el 19 landoj en Artigues apud Bordojo inter la 3-a kaj 11-a de majo 2013. Estis vera defio kunigi kongresojn de la plej granda aliĝinta faka asocio de UEA kaj de unu el plej grandaj Landaj Asocioj. Tio certe donis kapdolorojn al la kasistoj de ambaŭ organizaĵoj, des pli ke la oficiala kongreso de UFE, kun ĝenerala membrokunveno kaj aliaj laŭstatutaj kunvenoj okazis nur en la dua parto de la semajno. Sed la partoprenantoj de ambaŭ asocioj tre ĝuis la rezulton! La grandaj avantaĝoj estas, ke tiel eblas havi multe pli riĉan kulturen programon, kaj evidente ke tio garantias internacian etoson, kio malpli facilas en nur unu-landa kongreso. La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn. Tial povis kuniĝi senprobleme la du asocioj por siaj jarĉefkunvenoj.



Dum la solena malfermo salutis la prezidanto de IFEF Rodica Todor, la prezidanto de LKK Sylviane Lafargue, la vicprezidanto de UEA Claude Nourmont, nome de ILEI Stefan macGill, prezidanto de Espéranto-Gironde Bernard Sarlandie, la reprezentantoj de la diversaj partoprenantaj landoj, vicprezidanto de la Akademio Brian Moon. Tre interese parolis Jean-Marie Darmian, vicprezidanto de la Departementa Konsilio, kiu tuj poste verkis entuziasman raporton sur sia blogo

<[www.jeanmariedarmian.fr](http://www.jeanmariedarmian.fr)>.

Dum la plenkunsido de IFEF estis reelektita la ĝisnuna estraro por la periodo 2013-2016 kaj akceptita nova landa asocio de IFEF: Kuba Esperanto-Fervoĵista Sekcio el Kuba Esperanto-Asocio. Nova Estraro de UFE estis elektita kun denove Axel Rousseau kiel prezidanto kaj inter alie vicprezidanto pri la UK 2015 (okazonta en Lille).

IFEF havis siajn fakajn kunsidojn kaj fakajn vizitojn. La kongresa temo «La rolo de la fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo» instigis al pluraj fakaj prelegoj. Andrej Grigorjev el Siberio prelegis pri fervoĵista sindikato, Stefan MacGill el Hungario/Novzelando pri la rolo de fervojo en moderna mondo, Michel Lafosse pri bordoza tramo, Robert Combes pri la konstruado de la viadukto de Fades, Mireille Grosjean pri japanaj trajnoj. Inter alitemaj prelegoj: Daniel Moirand, tradukinto de la verko, parolis pri 1001 noktoj, pri la reta radio Muzaiko klarigis Veronika Poor kaj la nuna volontulo de TEJO ĉe Centra Oficejo Quentin Weber-Seban prezentis la junularan movadon.



Dum la kongreso oni ĝuis multajn spektaklojn. La sekreto de la magia trajneto malkaŝis La Kompanoj. Maragane prezentis okcitanajn kantojn, la konata duopo Kajto plukajtumis kaj lokomotivis kaj la internacia koruso Interkant' montris sian novan spektaklon «Ĉirkaŭ Karmen», tre imponan.

Ekskursoj kondukis al famaĵoj de la regiono:

Bordoza, Blajo, Saint-Emilion, Arkaŝono, la landezia vilaĝo en la subĉiela muzeo Marquèze, estuaro Ĝirondo.

Rimarkinda estis eldono de tri numeroj de kongresa bulteno, kiun vi povos legi ĉe retejo de IFEF: <http://ifef-ufe-2013.over-blog.fr/>, kun amaso da fotoj. Fotojn kaj gazet-artikolojn (en la franca) pri la Kongreso en la retejo de UFE : <http://esperanto-france.org/congres-national-2013>

Claude Nourmont

## EDE KONSULTIĜIS EN HUNGARIO

Inter la 14a kaj la 16a de junio 2013 okazis en Alsooers ĉe la lago Balatono la 12-a politika diskuto pri Lingvaj Rajtoj en la Eŭropa Unio organizita de Eŭropo-Demokratio-Esperanto. Ĉeestis partoprenantoj el 5 Eŭropuniaj landoj: Francio, Germanio, Pollando, Hungario, en kiuj EDE estas agnoskita kiel politika partio aŭ politika organizaĵo kaj Bulgario kiu ĵus transdonis la peton por la agnosko ĉe siaj ŝtataj organoj.

Robert Leleu raportis pri la laboro de EDE-Francio kaj pri la komenciĝintaj preparlaboroj por la Eŭropuniaj Parlamentaj Balotoj en 2014. Li emfazis la gravecon de la origine komencita agadmaniero de „sube“ de EDE-Francio alparoli senpere la civitanojn antaŭ la balotoj.



Stanislav Rynduch emfazis por EDE-Germanio ankaŭ la gravecon de senpera agado de „sube“ sekvante la francan EDE dum la antaŭa partopreno en EU-balotoj. La germanoj volas ankaŭ ĉi-foje partopreni en la EU balotoj 2014, se ili sukcesas denove kolekti 4.000 subskribojn (en 2009 eĉ 7.000), kio precipe dependas de la helpa apogo de esperantistoj.

Kazimierz Krzniak raportis pri la granda sukceso de la EDE-Polando. Ilian metodon oni povus nomi „desupre“, ĉar ili sukcesis alparoli parlamentanojn kaj eĉ senatanojn, altrangajn politikistojn, por apogi Esperanton. Li emfazis, ke tio sukcesis nur pro la internacie politika celdirekto de EDE. Kaj tion ne sukcesis atingi la Pola Esperanto-movado.

Blazio Wacha raportis pri la metodo de EDE-Hungario. La verŝajneco partopreni la EU parlamentaj balotoj estas malgranda pro la necesaj multnombraj subskriboj. Tamen, se la hungaraj esperantistoj estus pli lojalaj al politika movado de EDE, pro la grandnombraj esperantistoj, eĉ eblus atingi la necesajn subskribojn. Ĝis nun EDE-Hungario organizis prelegojn kun ankaŭ altrangaj prelegantoj, ĝenerale pri lingva demokrateco kaj aktive informis la „eksteran“ mondon pri Esperanto. Attila Kaszas malonge klarigis la politikan situacion de la lando en kiu okazis nia kunveno. Li nomis (iomete ironie) la hungaran nuntempan politikan doktrinon „Orbanismo“ laŭ la nuna hungara prezidanto Viktor Orban.

Bojdar Leonov el Bulgario, informis pri la ĵus fondita EDE-Bulgario petanta registriĝon ĉe la ŝtataj organoj, kiu pro burokrataj kialoj verŝajne daŭros kelkajn semajnojn. Pro la konateco kaj aktiveco de profesoro Leonov en diversaj organizaĵoj en Bulgario EDE havos bonan

startpozicion. Ankaŭ prof-ino Eva Bogajeva esprimis sian volon kunorganizi EDE-Bulgarion, kiu havas influon en universitato kaj inter studentoj.

Stefan Mac Gill informis pri la nova stretegio de UEA, kiu estas atendebla post la novelektota estraro kun la prezidenteco de Mark Fettes. Estas rimarkebla nova vento, kiu ne stariĝas rigide rilate la politikan neŭtralecon, sed akceptas la realecon, kio ĉiam montriĝis en la politika reago al la ekstera mondo, ankaŭ se la esperantistoj ofte ne volis tion akcepti.

Eugen Macko emfazis la gravecon de internacia kunlaboro en EDE-Federacio kiel sekvo de sukceso por ĉiu landa agado. Ni konkrete spertas, ke la sukceso de unu landa agado instigas la plulaboron de aliaj. La diligenta laboro de la pola EDE donis novan elanon al aliaj landaj asocioj. Sendepende de la metodo. Ĉu de sube aŭ de supre, la plej grava por EDE ĝenerale estas la inter-nacia kunlaboro rilate la akcepton de la minimuma federacia programo de EDE. Tiun, jam longe diskutitan Federacian Programon el la jaro 2011 en la nuna kunveno ni denove pridiskutis kaj nur kun malgrandaj plibonigoj kun unuanima voĉdono akceptis kaj metis en la reton por plua diskutado.

Eugen Macko

## GERMANA ESPERANTO-KONGRESO



Kiel ĉiujare dum la pentekosta semajnfino okazis de la 17-a ĝis la 20-a de majo 2013 Germana Esperanto-Kongreso, ĉi-foje la 90-a, en Nurenbergo. Samtempe oni festis la 125-jaran jubileon de la unua Esperanto-grupo, kiu fondiĝis tie. Partoprenis pli ol 80 personoj, kelkaj ankaŭ el eksterlando. La programo komenciĝis per akcepto en la historia urbodomo de Nurenbergo. Vespere okazis jubilea festprelego de profesoro Martin Haase,

lingvisto el Bamberg, kiu parolis pri la pionira rolo de la urbo Nurenbergo en diversaj kampoj de tekniko kaj kulturo.

Dum la kongreso okazis ankaŭ diversaj prelegoj pri temoj politikaj, kulturaj kaj esperantologiaj. Ulrich Matthias prezentis la partion Unu Mondo, kiu partoprenos la Eŭropajn Balotojn 2014, Eugen Macko parolis pri la demando “Kial estas Esperanto politika?”. La psikiatro Thorsten Suese prezentis sian nove verkitan romanon germanlingvan *Toter Lehrer, guter Lehrer* (Morta instruisto bona instruisto), en kiu Esperanto ludas gravan rolon. Marek Blahuš prezentis la esperantlingvan vikipedion kaj kune kun Peter Balaž prezentis novaĵojn de Edukado@Interreto. Oni prelegis pri Titus Brandsma (1881-1942), nederlanda esperantisto murdita en la koncentrejo Dachau, kaj pri Joachim Giesner (1913-2013), esperantisto kaj fervojisto el Herzberg.

Estis ankaŭ ebloj fari diversajn ekskursojn gvidatajn en kaj ĉirkaŭ la urbo Nurenbergo, interalie al la mondfama produkto de kraĵonoj de la firmao Faber-Castell en la urbeto Stein. Dum la vesperoj oni prezentis kurtfilmojn el la konkurso de GEA, krome la filmon *La Granda Diktatoro* de Charlie Chaplin kun esperantlingvaj subtitoloj, muzikan programon de Ĵomart kaj Nataŝa kaj la teatraĵon *Galileo*, verkitan de Bertolt Brecht kaj en Esperanta plenumo de Saŝa Pilipović.

Dimanĉon la 19-an de majo okazis la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio, kie elektiĝis Sebastian Kirf kiel la nova prezidanto. Li sekvas Rudolf Fischer, kiu pro statutaj kialoj ne plu rajtis kandidatiĝi.

Yashovardhan  
(El Esperanto-Revuo de UEA)

## POSTEĤOJ DE LA JARO DE TIBOR SEKELJ



La eldonejo "Grafokom" el Kroatio aperigis novan libron de la fama esperantisto kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj en Esperanto. Temas pri la porinfana romano "Padma, la eta dancistino", kies scenejo estas la hinda vilaĝo Kondapuro.

Jen kelkaj informoj pri la libro:

Formato: 16,5 x 20,5 cm

Paĝoj: 80

Ilustrita (ilustristo: esperantisto Tihomir Lovrić el Zagrebo)

Fortika bindo

Pliaj informoj ĉe: [grafokom@kc.htnet.hr](mailto:grafokom@kc.htnet.hr)

Josip Pleadin

## INTERESA NOVTTIPA LOKA KUNVENO

Berlina Esperanto-Societo havis tre interesan ideon por organizi alitipan kunvenon de sia anaro. Okaze de la eniro de Kroatio al Eŭropa Unio ili decidis dediĉi sian kunvenon al Kroatia E-movado la 7-an de julio kaj tion ili volis havi tute aktuale. Do ili proponis skype-kunvenon kun kelkaj konataj esperantistoj el Kroatio. Kun la teknika helpo de Chuck Smith la berlinanoj kunvenintaj en sia sidejo estis skajpe-ligitaj kun Zlatko Tiŝljar kaj Spomenka Ŝtimec en Zagrebo je la 20-a horo vespere. La kunvenon gvidis la prezidanto de la Berlina E-Societo Fritz Wollenberg kaj ĝi daŭris 90 minutojn. La berlinanoj havis multajn demandojn kaj la zagrebanoj interese respondis. Oni parolis ankaŭ pri la tradicia kunlaborado inter kroataj kaj germanaj esperantistoj.

Tiu ĉi maniero havi en la loka kunveno vive eksterlandajn gastojn kvankam ili sidas hejme, estas rekomendinda por aliaj societoj kiel bona maniero vigligi la societan vivon.

Zlatko Tiŝljar

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Finredaktita: la 15-an de julio 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Seán Ó Riain, Jozef Reinbart, Zsófia Kóródy, Francesco Maurelli, Halina Komar, Eŭgeno Macko, Redakcio de Disvastigo, Yashovardhan, Claude Nourmont, Josip Pleadin.

Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

